# KIEL DIRI TRIMANIERE

(6-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:

Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14**

**Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.**

Estante ekster sia lando, S-ro Fredo flugas per helikoptero trans kaskadegojn. Li estas veturanta al la domo de Georgo, lia nevo.



For de sia nacio, S-ro Fredo flugas helikoptere super akvofalegoj, veturante al sia nevo Georgo.

Elirinte el sia patrujo, S-ro Fredo pasas per helikoptero trans grandajn kaskadojn, irante viziti sian nevon Georgon.



Veturante plu, nun sur maro, li vidas, ke du balenoj preterpasas la ŝipeton, per kiu li navigas.

Dum li ankoraŭ vojaĝas, ĉi-foje sur maro, li rigardas paron da balenoj pasi preter la ŝipeto, per kiu li estas naviganta.

Nun navigante sur maro, li ekvidas du balenojn preterpa-santajn la ŝipeton, per kiu li vojaĝas.



Veturante per trajno tra inter arboj, S-ro Fredo elrigardas la belan pejzaĝon apud rivero.

Dum li veturas per vagonaro inter arboj, S-ro Fredo miras la allogan pejzaĝon ĉe rivero.

Vojaĝante per trajno tra inter arboj, S-ro Fredo admiras la logan pejzaĝon tre proksiman de rivero.

Pasante per ŝipo tra mallarĝa kanalo, li ricevis telefonaĵon de Georgo.



Trapasante ŝipe tra mallarĝa kanalo, li respondis telefonalvokon de Georgo.

Dum li veturis per ŝipo sur mallarĝa kanalo, li estis alvokata de Georgo per telefono.



Surprize, Georgo diris per telefono, ke li veturas per aviadilo, por akcepti la onklon ĉe flughaveno de granda urbo.

Surprizante la onklon, Georgo telefone anoncis, ke li flugas per aeroplano, por renkontiĝi kun li en flughaveno de urbego.

Surprizante, Georgo telesciigis al la onklo, ke li vojaĝas per avio, por renkonti lin en flughaveno de metropolo.



← Flughaveno

Flugpanelo →




Apenaŭ Georgo alvenis en la flughavenon, li rigardis la flugpanelon kaj konstatis, ke lia onklo baldaŭ alvenos.

Tuj kiam Georgo alvenis al la flughaveno, li vidis la flugmontrilon, kaj rimarkis, ke lia onklo estas baldaŭ alvenonta.

Apenaŭ Georgo aliris al la flughaveno, li trarigardis la flugtabelon kaj vidis, ke lia onklo estos baldaŭ alveninta.

Valizo-rul-tapiŝo




Kvankam li neniam konis la onklon antaŭe, Georgo tuj rekonis lin, kiam tiu ĉi elvenis el la bagaĝprenejo de la flughaveno.

Malgraŭ tio, ke li ne estis koninta la onklon, Georgo sammomente sciis, kiu estas li, kiam ĉi tiu aperis el la flughavena sektoro de valizo-rul-tapiŝo.

Eĉ tiel, ke li neniam konis sian onklon antaŭe, Georgo rapide rekonis lin ĉe la elirejo de la bagaĝ-liverejo.



**Tuj prenonte aeran taksion,**

**S-ro Fredo demandis:**

***" - Kiel fartas vi, mia fratino kaj mia bofrato?"***

**Antaŭ ol eniri en flugtaksion, S-ro Fredo faris la jenan demandon:**

***"- Kiel sanas vi kaj viaj gepatroj?"***

**Tuj enveturiĝonte en aeran taksion, S-ro Fredo faris la sekvan demandon:**

***"- Kiel vi, Analia kaj Karlo fartas?"***




Eltaksiiĝinte en la loĝurbo de Georgo, S-ro Fredo kontaktiĝis per telefono kun la hotelo, por nuligi la antaŭmendon. Li engastiĝos ĉe la nevo.

Elirinte el la flugtaksio en la urbo de Georgo, S-ro Fredo telefonis al la hotelo, por malfari la mendon. Li restos en la domo de sia nevo.

Kiam ili eliris el la flugtaksio, en la urbo, kie loĝas Georgo, S-ro Fredo telefone malmendis la hotelan gastiĝon. Li decidis gasti ĉe la nevo.